


# SUDFRANCIA STELO

N° 199 - 4a kvaronjaro 2011 - 4<sup>er</sup> trimestre 2011



**Bulteno eldonita de la Esperanto-Federacio de Langvedoko-Rusiljono**

**BONAN  
NOVAN  
JARON**

Je fino de jaro, ni ĉiam provas fari bilancon de nia agado. IREM 2011 en Sète estis la granda evento de la jaro, dankon al ĉiuj kiuj laboris kaj helpis por ke ĝi iĝu sukceso.

Antaŭ kelkaj jaroj renaskiĝis la grupo de Nîmes, kiu invitas nin por nia venonta ĝenerala jara kunveno la 31an de marto 2012, bedaŭrinde en ĉi tiu jaro la grupo de Perpignan malaperis espereble nur provizore. La demandaro kunmetita celas helpi nin por pli bone agadi por ĉiuj, bonvolu respondi kaj sendi al la redaktoro. Atentu, dum la lasta kunveno evoluis la abontarifo de SFS por 2012 **vidu je paĝo 9**. La estraro deziras al ĉiuj FELIĈAN kaj ESPERANTAN JARON 2012.

J.F. Passarella.

**Enhavo:** vortoj de la prezidanto  
P 2 : Novaĵoj el niaj grupoj  
P 4 : Restado en Malgrat de Mar  
P 5 : Zamenhofa Tago en Béziers  
P 6 : kaj en Montpellier,  
P 7 : Zamenhofa Tago en Nîmes  
P 8 : La 96-a Universala Kongreso de Esperanto en Kopenhago  
P 10 : Pri la asocio Interkant'  
P 12 : KER-ekzamenoj : korektoj  
P 12 : Kristnaskofabelo  
P 15 : Kien ni iros ?  
P17 : Tibor Sekelj, dua parto  
P 21 : Novaĵoj !  
P 22 : Androjda Esperanto-radio  
P 22 : Mesaĝoj de PROBAL  
DASGUPTA Prezidanto de UEA

Bonvolu sendi viajn informojn, fotojn artikolojn, kaj novaĵojn al Christian MOURE  
15, rue du Verdier 34120 TOURBES [xianmoure@orange.fr](mailto:xianmoure@orange.fr)  
Comité de relecture : Josée BOCCADIFUOCO, Marie-Blanche FONDRILLON, Arno LAGRANGE

### CENTRE CULTUREL ESPERANTO DE MONTPELLIER

S-no Reine Celiqua Le Saint-Hubert B44 31, Rue des Chasseurs 34070 MONTPELLIER

**Contact, courrier** : S-o Serge Eysseric 689, Chemin du Mas de l'Huile  
34980 MONTFERRIER-sur-LEZ

#### **Raporto pri la unua kunveno de la jaro 2011-2012.**

Kiel kutime, renkontiĝis je la 10-a, en salono de la Ĉiesdomo l'Escoutaïre, 14 esperantistoj, kaj inter ili nova lernantino, Christine, kiun lernigos Jeannine.

**1.** Post la BONVENO al ĉiuj, post la demandoj pri la neĉeestantoj, la prezidanto informas pri la novaĵoj, aŭ petas de iuj paroli pri aferoj, kiuj interesis ilin dum la somero.

**2.** ASOCIA FORUMO de la 11-a de septembro en Montpellier : hundotaga temperaturo, homamaso, same kiel la loko estus strando ; promenis familioj, soluloj iomete perditaj, revemaj geamantoj sin tenante per la manoj, same kiel la urbo subite malpleniĝus. Praktike, la budo de nia asocio ne estis tre bone lokita, fine de linio en akcesora vojeto. Tamen, ne plendu nin ! Multaj gevizitantoj akceptitaj de viglaj gesamideanoj, ĉar, en tiu tago, la pli malpli maljuna teamo vidis junan skipon agi efike por la esperanta lingvo : Corinne, kiu dum la someraj monatoj, rikoltis pli ol 1000 subskribojn, kadre de la petskribo « *espéranto au bac* », kaj André, studento en Montpellier.

Pluraj personoj komunikis sian adreson, unu prezentis sin, hodiaŭ. Ni ankaŭ tre dankas tiujn, kiuj frumatene, ĉiujare, luktas kontraŭ la malbenitaj elementoj de la tendo, por ke la budo estu komforta ; ni ŝatas la laboron de tiuj, kiuj dum la tuta tago klarigas al la gevizitantoj la kialon de la internacia lingvo, ĝian disvastiĝon tra la tuta Mondo, eĉ iomete da gramatiko ĉar iuj estas scivolemaj.

**3.** NOVA JARO, NOVA HORARO por la semajna babilado en la Ĉiesdomo Georges Brassens :

ĉiun mardon, je la 17-a kaj duono, ĝis la 19-a. Venu kun ni, buse (n° 15, haltejo Place d'Italie) aŭ per tramo linio 1-a kaj buso n°15, sama haltejo. Josée volonte akceptas pliajn gelernantojn.

Sed, en Ĉiesdomo l'Escoutaïre, la kursoj daŭras ĉiun ĵaŭdon, je la 10-a, ĝis la 12-a. Instruistino : Jeannine. Plie, ŝi akceptas en sia domo du junajn gelernantojn, Diane kaj André kiuj, pro kursoj en universitato, ne povas ĉeesti en la Ĉiesdomo. Ni tre dankas ŝin.

**4.** MONATAJ KUNVENOJ. ZAMENHOFA TAGO (*vidu sube*)

Iuj petis, ke estu bone elekti projekton por ĉiu monata kunveno kaj komuniki ĝin antaŭtempe. Jen la

datoj (kompreneble, ĉiam sabaton je la 10-a, ĝis la 12-a ; poste, komuna tagmanĝo, ĝis la 14-a) :

La 19-an de novembro,

17-an de decembro Zamenhofa Tago,

14-an de januaro, 4-an de februaro,

17-an de marto, 28-an de aprilo,

12-an de majo, 16-an de junio.

5. Kelkaj el ni elvokis somerajn eventojn. Nur Rosa partoprenis en la U.K.en Kopenhago. Joëlle ĉeestis en Le Caylar dum kelkaj tagoj, en julio, kie okazis kunveno organizita de Hubert Martin – kiu logas en tiu urbeto - : Festivalo pri malrapidaj vojaĝoj. Hanna iris en Hungario por kuniĝi al K.E.L.I. (Kristana esp-a Ligo). Komence de oktobro, Martine, kune kun amikinoj de Béziers, renkontis pli ol 130 gesamideanojn devenantajn de pluraj landoj, en la tre fama Esperanta Semajno en la urbo Malgrat de Mar en Katalunio: multaj interesaj kursoj, prelegoj kaj ekskursoj, en tre vigla etoso.

6. OLIVIER, kiu aliĝis al nia klubo dum la jaro 2011, KREIS « mirindan novaĵon » por ni, por vi : RETEJON el kiu jen la adreso :

<https://sites.google.com/site/ccemontpellier/home>

adreso de la retzorganto : [cce.montpellier@gmail.com](mailto:cce.montpellier@gmail.com)

La retejo estas en konstruo, sed vi jam povas viziti ĝin.

7. La bibliotekisto feliĉe ricevos helpon de Martine por fini la laboron : NUMERI KAJ KOVRI LA LIBROJN.

8. Corinne kaj André renkontis la teninton de la kinejo Utopia (en Montpellier, proksime de la universitatoj pri Sciencoj kaj pri Literaturstudado) por plani la projekcion de la filmo *Esperanto*, reĝisorita de la dokumentaristo Dominique Gautier ; tiu filmo estis prezentita en Sète dum la Interasocia Renkontiĝo, en aprilo.

Ni aldiras, ke ekde pluraj monatoj, HANNA KANTIGAS NIN fine de ĉiu kunveno ; oni ne scias ĉu nia ĥoro iĝos fama... eble necesos longa tempo. Dankon al ŝi.

Al ĉiuj geamikoj ni deziras bonan rekomendon de la kursoj kaj bonan kuraĝon.

...kaj, unu plian fojon, okazis agraba kaj babilada tagmanĝo.

Josée kaj Monique la sekretariino

\* \* \* \* \*

**AVEZ-VOUS SIGNÉ ET FAIT SIGNER LA PÉTITION**

**POUR L'ESPÉRANTO AU BAC ?**

**[www.esperanto-au-bac.fr](http://www.esperanto-au-bac.fr)**

**Déjà plus de 15000 signatures**

De la 1-a ĝis la 8-a de Oktobro : Dalia, Geneviève, Line (Béziers) Martine (Montpellier) partoprenis la 19-an internacian semajnon en Malgrat, ĉe la marbordo.



Ĉeestantoj: 130 alvenintaj el 11 landoj (46 el Francio). Mi retrovis, plezure, geamikojn kaj S-inon Aragay kiu instalas staĝojn de nia grupo (Batipaume, la Dragonnière).

La urbeto Malgrat dispartiĝas en du partoj: la antikva kaj ... la nova! En la nova (kie ni loĝas) staras ĉefe grandaj hoteloj kaj magazenoj en kiuj ni butikumis kaj aĉetis diversajn aferojn.

Dum la restado, ni sekvis la kursojn de Stano Marček kiu prezentis sian metodon, okazis ankaŭ pluraj paroladoj, prezentadoj aŭ la opero Turandot (DVD). Ni multe gajis, gustumante la faman ĉampanon "Esperanto", la havanan muzikon fare de la ensemblo "Rogers". Ofte, ni promenis sur la bulvardo. Pluraj kantistoj, vendistoj, artistoj multe amuzis nin. Ni vizitis, per trajneto,

Santa Suzana (apud Malgrat). De la monteto, ni vidis tre belan pejzaĝon. Alian tagon, ni iris tra la antikva Malgrat. Ŝipe, ni iris ĝis Tossa de Mar kie ni grimpis ĝis la turo. Buse, ni atingis Sabadell: tie ni vizitis la paleontologian muzeon, la novan bazaron, la ĝardenon kun akvofalo.

En Malgrat, oni inaŭguris, en 1912, la unua strato D-ro Zamenhof en la mondo. Kun registrara Sinjorino ni metis florojn antaŭ la impona monumento dediĉita al D-ro Zamenhof.

Krome, la suno multe brilis do Geneviève kaj Martine sin banis dum Dalia kaj Line nur metis siajn piedetojn en la varmega akveto...

Kampoj de legomoj, forcejoj ĉirkaŭas Malgrat. Multaj konstruadoj ĉesas, la grupoj ne plu funkcias. La regiono kaj la tuta lando suferas pro grava ekonomia krizo.

Nia komforta hotelo (Hotelo Kartago) entenis, malfeliĉe, sube, dancejon... Nokte, anstataŭ bone dormi, nia kapo multe ludis "disko-muzikon"! Finfine, ni uzis dormigilon aŭ orel-ŝtopilojn por iomete dormi. La organizantoj promesis elekti, por la onto, hotelon sen dancejo.

Kiam ni revenis hejme, pluvo kaj vento akompanis nian veturadon. En Malgrat, multaj hoteloj ĉesis aktivadon ĉar la turistoj foriris.

Jam, la estraro de la kunveno esploras la marbordon por trovi bonan lokon, prepari la tagordon, la ekskursojn, la distraĵojn por, tiele, plibonigi la venontan restadon.

Dalia, Geneviève, Line, Martine

Kia bela festo ! Proksimume 25 samideanoj kune festis gaje la tutan tagon. Matene ni rigardis lumbildojn de Marithe pri la U.K. Kongreso, kiu okazis lastan someron en Copenhague. TIU vojaĝo ŝajnis al ni tre interesa kaj ĝi allogis nin por partopreni aliajn similajn kunvenojn. Sekve Laurence rakontis pere de bildoj la restadon de la Japanoj septembre en nia urbo. Kun plezuro unuj malkovris kaj aliaj rememoris afablajn momentojn.

plantan nomatan « nombril de Vénus », kiu kreskas sur muroj. Ĝi bongustas .

Post la kafo komenciĝis la distra parto. Aurélia kaj Valérie, novaj lernantinoj prezentis ĉiujn partojn de la programo : teatraĵon, muzikon, poemojn kaj la ŝnurludon. Multaj el la ĉeestantoj partoprenis en la ludo, kiu tre plezurigis nin : siavice Dalia kaj Laurence metis demandojn. Laŭ la respondo ni devis iri dekstren aŭ maldekstren de la ŝnuro.



Poste la mateno finiĝis per kelkaj divenaĵoj Tiuj, kiuj trovis la solvon gajnis donacetojn.

La enigmoj kaj la aperitivo malsatigis nin. Ni manĝis bone kaj multe la diversajn nutraĵojn preparitajn de ĉiuj el ni. Monique prezentis al ni novan sovaĝan

La konkludo estas : ĉiuj apartenas al homaro.

Antaŭ ol disiĝi ni kune kantis la « Espero ». Por pli bone kanti ĝin ni laboros por la venonta jaro.

Vere : kia bela festo !

La C.B.E.

Ĉi-jare, la 17an de decembro, en Escoutaire, kuniĝis ĉirkaŭ 20 gesperantistoj, el Montpellier kaj el Béziers . Veno de ĉiuj geamikoj, jam varmigus la etoson, malgraŭ la ekstera malvarmo, la suno ankaŭ partoprenis nian kunvenon .

Do, je la deka, preskaŭ ĉiuj sidiĝis ĉirkaŭ granda tablo kaj kafo, teo, kuketoj estis je ilia dispono. Oni havis tempon iom babili (jes vere, ĉiam estas babilulemoj !!! ) .

Iom antaŭ la 11a, Alice, juna studentino, klarinete ludis LA ESPERON, poste ĉiuj kantis iom pli bone ol sen muziko . Do perfekte. Andreo, Diana kaj Alice, muzikis kaj kantis plurajn kantojn tradukitajn de la Reuniona lingvo al la Esperanta, kio multe plaĉis al la ĉeestantoj. Ili sindoneme kantis kaj vere la ĉeesto de tiuj tri junuloj plus Aurelia, ankaŭ junulino kiu venis el Béziers, estis kiel venteto de juneco por nia Zamenhofa tago. Fakte mi dirus, ke ĉi-jare ĉeestis iom malpli da maljunuloj ol pasintaj jaroj ? Ĉu mi eraras ? Laŭ mi ne ! Do ĉio bone.

Nun mi daŭrigas la eventojn, aŭ pli bone dirite la programon, post la kantoj, Hanna bone diris poemon, poste Rosy, sola, ludis skeĉon, ĉar ni bedaŭris la neĉeeston de Maria, kiu devus ludi kun Rosy. Ni esperas, ke Maria ne malbone fartas.

Poste, Martine diris ŝercon, eble tio estis la unua fojo, por ŝi ?

Venis la vico de Monika kaj Josée ludi Monologon pri Soleco de Emilia Lapenna : la publikulino, kiun ili jam ludis kelkfoje ( ne diru ke monologo bezonas nur unu ludanto, ĉar se la dua persono ludas nur per vizaĝo, estas vera monologo, ĉu ne ? )

Poste, Johano Maria montris bildojn de sia vojaĝo kun Marithe al Kopenhago kaj tio interesis ĉiujn; dankon al ili.

Denove la juna triopo Diana, Alice



kaj Andreo ludis skeĉon verkitan de Diana, gratulojn al ili.

Venis la horo tagmanĝi, kelkaj foriris, sed sidiĝis ĉirkaŭ la tablo multe pli da geamikoj ol kutime, tio



estis vera ĝojo. Kiel kutime, estis multe tro da manĝaĵo sur la tablo, sed nenio estis perdita, iuj kunportis hejmen por manĝi vespere aŭ la morgaŭon. Eble iu fotis la kukon faritan de Serge, kiu surmetis verdajn stelojn sur la blanka supraĵo de la kuko? Kiam ĉiuj manĝilaroj estis formetitaj, ludoj kaj kantoj daŭris, post la foriro de la amikinoj el Béziers :

Jeannine "tipotigis" nin kaj Hanna testis niajn konojn pri Esperanto kaj la movado. Tiuj, kiuj bone respondis ricevis rekompenson (etan etan) tamen estis agrabla momento.

Antaŭ foriri, la tri junuloj ankoraŭ kantis, gitarludis kaj kun granda ĝojo en la koro, ni deziris unuj al la aliaj belajn festojn kaj ĝis la revido en 2012 .

Josée

\* \* \* \* \*

### Zamenhofa Tago en Nîmes 10-12-2011

Kelkaj partoprenantoj tradukinte sakraĵojn de Hadoko!



La 10an de decembro, ok anoj de la nemoza klubo kaj tri amikinoj festis la Zamenhofan tagon en la sidejo de la asocio.

Unue, ni havis ĝeneralan kunvenon: morala kaj financa raportoj estis aprobitaj kaj la estraro estis reelektita (Frédéric Bourquin kiel prezidanto kaj Zohra Mraihy kiel kasistino; ni neniam havis sekretarion).

Poste ni gustumis manĝaĵojn kaj trinkaĵojn kunportitajn.

Frédéric proponis ludon pri malsinceraj amikoj: estas vortoj kiuj ŝajnas samaj en franca kaj esperanta lingvoj. Poste, li prezentis liston de esperantaj sakraĵoj, kiujn kapitano Hadoko elkriis en “Krabo kun oraj pinĉiloj” kaj en “Tincĵo en Tibeto”; ni devis traduki ilin al la franca lingvo!

Fine, Emmanuel Peigné recitis esperantan tekston kaj Benoît Doutreleau ludis kelkajn melodiojn per fluto.

Dankon al ĉiuj partoprenintoj pri la bona etoso.

Cercle culturel espérantiste nîmois;  
185 chemin du Mas Bonnet 30000  
NÎMES;


Tel: 09 54 01 01 30; courriel:  
[frederic.bourquin@laposte.net](mailto:frederic.bourquin@laposte.net);  
blog: [esperantonimes.wordpress.com](http://esperantonimes.wordpress.com)

## La 96-a Universala Kongreso de Esperanto en Kopenhago

Ni elektis vojaĝi per aŭto ĉar ni volis viziti la landojn ĝis Kopenhago. Ni trairis Belgion, Nederlandon, Germanion...

Ni haltis en Lieu Saint Amand, malgranda vilaĝo proksime de Valenciennes en Nordfrancio, poste ni haltis en Lübeck (norde de Hamburg) belega urbeto kun siaj ok sonorilturoj...

Ni ŝipiris por atingi Danion, finfine ni alvenis akurate al la kongresejo kaj al nia proksima hotelo.



### Pri la Kongreso

Dimanĉon, solena inaŭguro, bonvenmesaĝo de la kongresa komitato, prezentado de ĉiuj landoj, ktp... oni kantis la Espero(n), kaj, la Prezidento malfermis la 96-an U.K. per globkraĵono !

Pli ol 1450 gepartoprenantoj el sesdek landoj kongresis. Ni partoprenis al diversaj agadoj, cefe al la paroligaj kursoj, la KER (*Komuna Eŭropa Referenckadro ekzamenoj*), kiu estis grava afero dum la kongreso kaj eble, de la jaro ! Ni multe babilis



kun aliaj geesperantistoj kiuj ni renkontis...

La alia afero pri kiu ni zorgis, estis la kultura movado, de la nacia vespero en la parko de TIVOLI kun *la Grolanda koruso*,... la kongresa balo kun JoMo, kaj la ĵazbando,... kariljona koncerto de Belga Jo Haazenla al la preĝejo Sankta Spirito,... La teatro : « *Dek tagoj de kapitano Postnikov* »; la filmo « *atako de la lunaj zombioj* »; kaj la internacia arta vespero...



Ni vizitis la urbon, la kanalojn, la stratojn kun ĝiaj bicikloj, kaj evidente, la marvirineton.

La lando zorgas pri daŭrigebla disvolvo, la energio per ventmotoroj,



la agrikulturo (multe da tritiko, hordeo, aveno pro la ĉevaloj, la porkoj...)



Merkrede, ni ekskursis al Roskilde situata en la fundo de fjordo, ni vizitis la Vikingŝipan muzeon, kun la restaĵoj de kvin vikingaj ŝipoj aŭ drakŝipoj, ni daŭrigis ĝis, la urba katedralo kie troviĝas la tomboj de reĝoj, de la reĝino (Margrethe I), kaj aliaj danaj nobeloj.



Sabate, la prezidento fermis la U.K. per kelkaj vortoj de poezio... (*la vortoj kiujn la globkrajono verkis*)

Por reiri hejmen ni trairis Danion, la grandegan ponton 18 km longan (*granda belt*) inter Seeland kaj Fionie, ni haltis en Kolding (en Jutland), poste en Brene



(Germanio); Groningue norde de Nederlando; ni daŭrigis la vojaĝon ĝis Lieu Saint Amand, Montpellier, Béziers...

JML-MTR



**Abonnement au SFS pour 2012:** Pour les membres de la fédération (cotisation 2,00 €)

- envoi gratuit de la version numérisée par internet (si vous n'avez jamais reçu SFS par le net ou avez changé d'adresse contactez le rédacteur [xianmoure@orange.fr](mailto:xianmoure@orange.fr))
- envoi postal : 8,00€ (soit 10,00€ avec la cotisation) payable à votre groupe ou directement à notre trésorière : Maria PEREZ Y SANZ 13bis, rue Haute 30310 Vergèze. Vous recevez également la version numérisée si cela est possible.

Pour les non-membres

- uniquement par voie postale : 8,00€ sans version numérisée.



### **Kiel la projekto naskiĝis.**

Antaŭ pluraj jaroj, Franjo Leveque petis al Georges Lagrange traduki la faman hispanan 'Ĝeneralan Kanton'. Li multe klopodis por sukcesi en tiu ampleksa laboro. Plurfoje, poste, li petis novaĵojn de la projekto, sed nenio okazis. Georges Lagrange forpasis, Franjo renkontis Guy Martin kaj kune decidis konkretigi la projekton longtempe forgesitan. Ŝi fondis la asocion Interkant', helpe de la koruso de Bretonio, kiu delonge kune kantis. Pluraj korusetoj sin ligis al Interkant' por seriozigi la koruson.

### **• Kiel mi decidis partopreni la projekton.**

La unuan fojon kiam mi renkontis Franjo-n, estis en Pau dum la kongreso de SAT-Amikaro. Ŝi kantigis la volontulojn en diversaj momentoj. Jam de pluraj jaroj mi deziris kanti en koruso, kaj tiu sperto

multe plaĉis al mi, ĉar ŝi estas tre bona ĥorestrino. Ŝi ĉiam kuraĝigas la kantantojn, neniam koleras kaj sukcesas atingi belan rezulton kun ne-spertuloj. La unuan koncerton de Interkant' okazis en Bouresse la 10an de aprilo 2009, por memorigi la laboron de Georges Lagrange, kiu tradukis grandan parton de la Ĝenerala Kanto el la hispana. Mi vidis fotojn kaj legis artikolon pri tiu koncerto, kiu tre interesis min. Tiam, en la tuta Francio, oni parolis pri tiu kultura evento kaj fondiĝis pluraj grupetoj pretaj labori por kuniĝi kun Interkant'. Tiel Jeanne-Marie Cash vokis homojn el la tuta suda regiono por kunkanti la 'Ĝeneralan Kanton': mi tuj respondis favore. Tamen, mi timis ! Mi neniam kantis en koruso kaj mi ne certis sukcesi.

- **Kiel Franjo sukcesis krei tutnacian, kaj preskaŭ internacian, koruson.**

Feliĉe, Franjo proponis materialon por helpi la nespertulojn kiel mi : ŝi kantis registrigante ĉiujn voĉojn kaj ankaŭ proponis pianan registradon por ĉiu voĉo. Tio multe helpis min, ĉar mi multe bezonis labori hejme. Dum du jaroj, Franjo vojaĝis de grupeto al grupeto por laborigi nin serioze kaj bonhumore tiun malfacilan kanton. Dank'al ŝi, aperis kantgrupoj en Parizo, en Le Mans, en Alzaco, kaj ŝi regule vizitis ĉiujn grupojn por labori en ĉiuj regionoj. Mi tute miras pri ŝia grandega energio !

- **La sukceso de la koncertoj.**

Dank'al tio, Interkant' proponis kvin koncertojn : en Bouresse, en Hilliono dum la kongreso de SAT-Amikaro 2010, en Kaiserslautern dum la komuna kongreso de UFE kaj GEA, en Le Mans, en Kubo dum la Universala Kongreso (kun helpo de nefrancoj), en Tuluzo kaj finfine en Parizo. Ĉiam estis muzikistoj : pianisto, flutistoj, vibrafonisto, perkutisto, du solistoj kaj unu deklamanto por helpi nin. Ni neniam sukcesis kanti perfekte, sed estas tre malfacile. Tamen, ĉiam la spektantoj varme aplaŭdis nin kaj miris pli la kvalito de la koncerto. Eĉ se oni eraras, la rezulto estas bela ĉar ĉiuj bone laboras kaj Franjo firme kaj atente gvidas nin. En Hilliono, tri bezieraninoj korusspektaklis : Geneviève Gaubert, sekretariino de la CBE, Geneviève Astier, amikino

ŝia, kaj mi. Poste nur mi daŭrigis tiun belan aventuron.

- **Bilanco de tiu tri-jara projekto.**

Franjo ricevis diplomon de UEA por sia kultura kontribuo al Esperanto en la mondo dum la Universala Kongreso en Kubo. Tiaj projektoj estas bonaj iloj por diskonigi Esperanton inter la homoj kiuj ŝatas muzikon. La precipa problemo estas financa : Franjo senpage laboras sed necesas repagi la vojaĝkostojn al ĉiuj regionoj. Plie la muzikistoj estas pagitaj pro sia malfacila laboro. La korusanoj multe pagas por partopreni al koncertoj. Nun, ne plu estas mono en la kaso por eki la novan projekton.

- **La nova projekto.**

Malgraŭ la malfacilaĵoj, la granda laboro petita de tia projekto, Franjo jam parolas pri nova granda arta spektaklo : Carmen. Atentu ! Ne temas pri opero, ni ne havas fortojn nek kapablecon por proponi tian spektaklon. Temas pri koruso, sed ankaŭ teatraĵo kaj dancado. Pro tio, estas ankoraŭ pli ampleksa projekto. Tamen mi ne timas, mi tute fidas Franjon por sukcesi proponi belan spektaklon ! Kaj ŝi pretas akcepti kaj bonvenigi ĉiujn personojn kiuj pretas danci, teatroludi, kanti sole aŭ korse. Tamen ŝi ne plu deziras vojaĝi de grupeto al grupeto por kantigi dekon da homoj. Nun, ni kune laboros en la esperantaj feriejoj Bouresse kaj Grésillon por vivigi ilin. Interkant' bezonas vin, mone aŭ home !

Véronique Bichon

## KER-ekzamenoj : korektoj, aldonoj

En la pasinta SFS, paragrafo 3.6.2 pri KER-ekzamenoj, la informoj estas malklaraj kaj eraraj. Do mi nun korektas por ke ĉiu bone komprenu.

Universala Esperanto Asocio subvencias la KER-ekzamenojn, pro tio la prezo estas sufiĉe malalta kompare al kotizo por aliaj lingvo-ekzamenoj.

"Union Française pour l'Espéranto" subvencias nur por UFE-anoj la KER-ekzamenojn laŭ sekvanta regulo : por junuloj malpli ol 30, du trionoj de la kotizo estas repagota ; por la aliaj nur unu triono de la kotizo estas repagota de UFE.

Ĉar hodiaŭ, junuloj kiuj volas iĝi instruisto (en bazlernejo, pri

matematiko, pri filozofio ktp) bezonas B2-diplomon (minimуме) en iu ajn lingvo por validigi instruekzamenon, gravas informi pri Esperanto. Por tiaj B2-kandidatoj, UFE finance helpas por trapasi ekzamenon en Budapeŝto de la unuaj kandidatoj ĝis la sistemo estos validigita.

Por studentoj, la ekzamenoj kiuj permesas ricevi B2-diplomon estas senpagaj en gimnazio, sed nur por lingvoj proponitaj de la lernejo (gimnazio, universitato...).

Kompreneble, Esperanto ne estas tia lingvo !

Véro

\* \* \* \* \*

## Kristnaskofabelo : Songo aŭ realeco

Anekdotoj pri invadistoj ; kredo min ili ne estos lumserĉantoj

Mi ŝatas la printempon. Ĉiujare la naturo redonas novan ŝancon al la arboj, plantoj, kiuj refoliĝas kaj verdiĝas.. Floras diversaj kampfloroj. Jen, najtingaltrilo, pepiado de aliaj birdoj ; ĉi-tiu birdĥoro ĉarmas la orelojn, resanigas la koron de la homoj por nova sezono.

Iun vesperon, la vetero estis tre bela, sufiĉe varmeta ĉitempe por siesti momenton sur la korto antaŭ mia kabano apud la arbaro. En la ĉirkaŭaĵo regis nur silento kaj kvieteco.

La naturo ofertas tian lukson. Tiam mi admiris la ĉielon kie brilis miliardoj da steloj, pli belaj ol tapiŝo el diamantperloj.

Kiu ne ŝatus tian etoson ?

Ekdormante mi decidis enlitiĝi : estis preskaŭ noktmezo.

Kun miaj okuloj ankoraŭ plenplenaj de ĉielbildoj, mi sinkis en profunda dormo.

Dum la nokto, dormante tre profunde mi kredis sonĝi ; verdire, dum mi turniĝis dekstren maldekstren, volviĝis en la littukon, eksalto vekis min kapteren sur la planko inter la lito kaj la komodo. Mi

ŝvitis, mi ŝajnis senposedigita de miaj pensoj.

Ekstere noktis, sed lumego en mia ĉambro ŝvelis supre de mia kapo.

Kio okazis? Subite lumego malaperis. Mi estis morte laca kaj reenlitiĝis, returnis min aliflanken en mia lito.

Frumatene mi ellitiĝis, ĉirkaurigardis dometon, ĝardenon, arbareton; mi nenion vidis.

En mia poŝtkesto mi trovis paketon, kiun ne alportis la poŝtisto. Strange! Singarde, de malproksime mi ekrigardis la pakaĵon. Mi suspektis ĉion. Finfine mi tuŝetis la paketon, kontrolis ĉiujn flankojn. Ĉio ŝajnis normala, ordinara, krom la paketo estis ligita sen ŝnuro, sen gluo.

La stranga paketo estis pakumigita nek per papero, nek per ledo; mi ne povis klarigi precize la materialon.

Tiam pli malpli rapide mi elpakis ĝin; interne de la eta kesto mi trovis objekton similan al ŝtono; sub la sunradioj ĝi brilis kiel mil fajretoj diverskoloraj.

Kiam mi ludis, kaj turnis en mia mano tiun pilkon, tiu-ĉi per granda flamsago montris al mi direkton al la arbaro.

Kion fari? Ĉu mi iros? aŭ ĉu ili akompanis min, sed kiuj?

Serioze mi devis pripensi antaŭ ol agi!

Mi devas konsiliĝi kaj diskuti pri la agmaniero konduki la aferon.

Ĉu mi diros la novaĵon al la urbestro? Tute ne, ĉar kompreneble li taksos min stultulo. Plie ŝajnis ke ĉitempe li vizitis la ŝirakejon, kies prezidento multe promesas kaj nenion plenumas.

La pastro vagas inter multaj paroĥoj! Eble li diros: mi ne prizorgas tiun 'belzebutan' (=diablo) aferon. Ĉu mi montros la pilkon al la psikologo?

Post pripensado mi decidis ne.

La psikologo per bela, milda teknika parolado dormigos min; resume: li konkludosn pri mia kompatindeco. Tio ne gravas tamen oni prigardos min.

Do, mi deziris scii la sentojn de miaj plej proksimaj najbaroj.

Mi transiris la kanalon. Kia tumulto! Ekde la kelo ĝis la tegmento moviĝis la loĝantoj. Ne kredeble, ili ĉirkaŭigis la domojn per fertrabo kaj dratoj eĉ betonis la fenestrojn.

'Kial estas tia cirko?' mi demandis.

-Por protekti niajn domojn kontraŭ la invadoj! ili respondis.

-Bone, bone, mi aldonis, se la danĝero venos de supre, kion vi faros? IDIOTOJ!

Aliaj, eĉ ne unu vorton ili parolis al mi!

Klinante la kapon ili foriris. Frenezuloj!

Ho! Dio mia! Vampo! Mi devas klarigi: ĉiesulino fariĝis aŭguristino!

Simple ŝi parolis: 'Kiu la kaĉon kuiris, tiu ĝin manĝu'. Ne timu, ŝi aldonis: iru vian vojon.

Fininte esplori tiun aferon kaj sen komforta subteno, mi malkontenta decidis rehejmeniri; abunda ŝvito fluis el mia vizaĝo kaj falis sur t-ĉemizon, aĉan aspekton mi montris.

Paŝante mi pensis, mi multe tro pensis, kiam en la kurbiĝo de la vojeto, mi ekmalkovris JOJO, la ebrulon kiu loĝas, nature, aliflanke de la strato.

- “ Kio okazis Jojo?

- Li respondis: Ĉiuj timas la nedeziratajn vizitantojn

- De kie ?

- Mi ne scias. Tamen mi aldonos iom pli! Mi petas monon por aĉeti litron da tiu vino !

- Do, jen mono. Diru!

- En tiu afero vi estas la suspektito numero unu. Oni asertos viajn interilatojn kune kun la fremduloj.

Mi koleris : blagoj, ŝercoj, klaĉoj, mokoĵ, insultoj. Oni atakas mian memon, indigne mi forfuĝis. Tro estis tro !

Lacega mi bezonis min duŝi, kaj multe dormi ; post bona nokto pli facile oni pripensos kaj trovos la solvon : la plej simpla estas la plej bona.

Pasis kelkaj tagoj por retrovi fizikan kaj spiritan mensan forton.

Tamen ĉiun tagon, konstante po multajn fojojn tage, mi konsultis la pilkon, kiu brilis indikante la direkton al la arbaro, pli kaj pli mi scivolis. Mi finfine pensis ke mi kalkulos nur pri mi.

Mi ne devas moliĝi, mi kuraĝigis min, kaj ek al la arbaro! Dirite farite!

Iun vesperon, je la sunsubiro kiam la lazura horizonto grizis, mi iris sola en la lokon kiun la pilko indikis al mi. Sub kverko mi atendis, mi atendadis, neniu venis, nenio okazis.

Mi prenis la pilkon, el kiu spruĉis flava lumo kaj ĝi iĝis tute blua, bone mi denove empoŝigis la pilkon. Elĉerpita per multaj malfacilaĵoj, malhelpoj, mi sterniĝis sub kverkon kaj dormetis.

Subite bloveto kaj bonodoro vekis min, grizakolora aparato, ovala ovoïda , longa, larĝa, dika kiel du ŝarĝaŭtoj alteriĝis kiel helikoptero sed sen helico, ĝi ŝajnis funkcii per energioj ne konataj de teranoj.

Fronte al mi, malsuprenirante la bluan ŝtuparon, estuloj iomete strangaj venis renkonte al mi, frapetis min ĉe ŝultroj, kaj per paroloj ne kompreneblaj de mi, kaj per mangestoj kondukis min interne de la aparato. Kia etoso! Mi vidis ĉielan mapon kiu ŝanĝiĝis kiel kineskopo, mi vidis planedojn post planedoj, stelojn post steloj, eksplodojn, aerolitojn.

Kia surprizo kaj emocioj! Admiri tiajn mirindaĵojn rekte sur la ĉielo !

La viroj estis grandaj sen haroj kun razita kranio, kun fortikaj muskoloj kiel grekaj luktistoj. La okulkoloro ŝanĝiĝis : helflava, verda, blua finfine tre nigra pro sunradioj. Ilia rozkolora haŭto estis glata. La virinoj estis malpli altaj ol viroj, sed tamen tipis bele, kun longaj rufaj haroj.

Ili estis ŝike vestitaj el kotono kaj silko laŭ mirinda modo.

Ilia parolmaniero preskaŭ kongruis kun ‘ Cseh metodo’, pro tio mi komprenis plej multe da vortoj.

Ili diris veni el ‘Ikea planedo’ dekmillumjarojn malproksima; vidante mian surprizon pri tiu distanco, ili aldonis: ‘la universo estas sen komenco kaj sen fino’. Ĉiun tagon la estuloj dum vivo malkovras novajn planedojn, sciencojn, teknikojn. Ni estas kiel polvo en senfina spaco.

Tiel ili deziris helpi aliajn gentojn, protekti teron kontraŭ poluado per novaj metodoj, jam uzitaj ĉe ili antaŭ kvar jarcentoj; kia konsternaĵo aŭdi tiajn vortojn, ni, la teranoj, venkantoj de spaco.

Ili kondamnis avarecon, malamikecon, murdojn, militojn, havemon, misuzon de potenco, malhumilecon, malnoblajn avidojn, ĵaluzon, perforton kaj ĉiujn tiujn aferojn kiel radikojn de ĉiuj mizeroj. Iliaj mesaĝoj, lastaj vortoj, fratecaj interrilatoj por la paco zumas al miaj oreloj.

Senbrue en bloveto kaj bonodoro la granda ovoidea aparato rapidege altiĝis kaj perdiĝis en la ĉielo en alta kumuluso.

Nun mi memoras la mesaĝon.

Ĉu ili ne estis Esperantistoj ?

Ĉu ilia lando ne estus Esperantujo ?

G.G.

\* \* \* \* \*

## KIEN NI IROS ?

### **Mediterranea Esperanto-Semajno en les Issambres (83) M.E.S. 2012**

Se ankoraŭ frostas en via regiono, venu al la Mediteranea Maro, kie floras mimozoj kaj migdalarboj.



Vin atendas amika, familia etoso, belegaj pejzaĝoj, bona ripozo kaj lazura maro!!!

25-a februaro ĝis 3-a marto 2012  
Residence Val d’Esquièrè – Les Issambres-Francio - Lazura Marbordo

Esperanto-Provence :

[www.esperanto-provence.org](http://www.esperanto-provence.org).

Aliĝkotizo: 60 eŭroj  
(familia aliĝkotizo: 100 eŭroj)

INFORMOJ KAJ ALIĜOJ:

**Monique Prezioso**, 92 allée des  
Harkis, FR 83700 Saint-Raphael,  
Francio rete:  
[prezmoni@hotmail.com](mailto:prezmoni@hotmail.com);  
tel. 0033 (0)4 94 83 06 88 aŭ

**Christine Graissaguel**, Les Iles  
d'Or, rue du progrès, FR 83600  
Frejus, Tel. 0033(0)494956618  
[kris\\_grai@hotmail.fr](mailto:kris_grai@hotmail.fr)

\*\*\*\*\*

<http://www.97uk-hanojo.com/>

### **Legendo de la Akvo-Melono** 13/12/2011



Foje, la sesa filo de reĝo Hung  
Vuong la Kvina nomita An-Tiem  
malobeis la ordonon de la reĝo kaj  
estis ekzilita al dezerta insulo.

La princo devis konstrui sian propran  
ŝirmejon, fosis puton por akvo, kaj  
fiŝis kaj ĉasis bestojn por manĝaĵo.  
Unu tagon, li trovis verdan frukton  
tiel grandan kaj rondan kiel pilko. Li  
dividis la frukton en duonojn kaj  
trovis la internon de la frukto ruĝa.  
Li ne aŭdacis manĝi ĝin timante, ke  
ĝi estis venena.

Tagoj pasis kaj la seka kaj suna  
sezono venis. Estis tiel varme, ke ĉiuj  
plantoj estis sekaj kaj ke la puto  
havis neniun akvon forlasitan. Unu  
tagon, An-Tiem estis tiel laca kaj  
soifa, ke li provis gustumi la frukton.  
Li malkovris, ke ĝi estis kaj bongusta  
kaj malsoifigis lin. Tiam, li provis  
kultivi la planton ĉirkaŭ sia domo.

Baldaŭ la tuta  
insulo estis  
kovrita per la verda frukto.

An-Tiem ĉizis la nomon de la insulo  
kaj sian propran nomon sur kelkaj  
fruktoj kaj ĵetis ilin en la maron.  
Poste, maristoj trovis la strangan  
frukton kun la nomo de An-Tiem  
flosantan en la maro. Baldaŭ,  
onidiroj pri la frukto atingis la  
kontinenton kaj multaj komercistoj  
provis trovi laŭ la vojon al la insulo.  
Danke al tio, la dezerta insulo fariĝis  
movoplena. La insulo nun estis  
superplena. Multaj boatoj alvenis kaj  
eliris. An-Tiem helpis ĉiun ajn, kiu  
deziris hejmiĝi en la insulo. Baldaŭ,  
novaĵo pri tio atingis la reĝon. Reĝo  
Hung Vuong estis fierega havi filon,  
kiu estis sufiĉe kuraĝa kaj forta por  
venki malfacilaĵojn sen iu ajn helpo.  
An-Tiem tuj estis alvokita reveni al la  
kortego. Li kunportis sian frukton  
por oferti al la reĝo, sia patro. La  
reĝo donis al li sian kronon kaj An-  
Tiem fariĝis reĝo Hung Vuong la  
Sesa.





Ekde tiam la frukto, kiu estis nomita "dua hau" /zũa haũ/, fariĝis la simbolo de bonŝanco; oni ofte ofertas



ĝin al parencoj kaj amikoj kiel novjara donaco.

*Fonto: Vietnam-culture.com*

*Esperantigis: Nguyen Xuan Thu*

\* \* \* \* \*

## TIBOR SEKELJ

### Dua parto

*el [http://eo.wikipedia.org/wiki/Tibor\\_Sekelj](http://eo.wikipedia.org/wiki/Tibor_Sekelj)*

#### **Fakoj**

Tibor Sekejl montris sin talenta en diversaj fakoj ligitaj unu al la alia. Li estis ĵurnalisto, esploristo, aventuristo, montgrimpanto, verkisto, desegnisto, filmisto, geografo, etnologo, muzeologo, poligloto kaj agis en politika tereno, rilatante kun politikistoj el kiuj menciindas pluraj ŝtatestroj. Lia agado elstaras pro sia defendo de Esperanto ĉe Unesko nome de UEA. Kunligante ĉiujn kampojn en kiu li agis emfazinda estas lia mondkoncepto kaj lia aliro al homoj el la tuta mondo.

#### **Geografo**

Vojaĝante li ja estis geografo per si mem, sed la vivo devigis lin iĝi vera kvalifikita geografo kaj li tiusence esploris kaj desegnis mapojn de

pluraj ĝis tiam neesploritaj partoj de Sudameriko, aparte en Bolivio kaj Brazilo. Pro tio eĉ iu rivereto en Brazilo havas lian nomon Rio Tibor. Li aperigis Mondmapon en Esperanto kaj redaktoris fakan revuon Geografia Revuo inter 1956 kaj 1964. En 1950 li iĝis membro de Gvatemala societo pri historio kaj geografio kaj, pro meritoj tiukampe, en 1946 la Reĝa Geografia Societo de Britio akceptis lin kiel membro FRGS. Lia libro « Tempesto super Akonkagvo » estis uzata en Argentino kiel helpinstruilo kaj en Meksikio iĝis lernolibro por montgrimpantoj.

#### **Ĵurnalisto**

Li lernis pri ĵurnalismo dum siaj studjaroj en Zagrebo kaj iĝis tie korespondanto de kroataj gazetoj : iu

el ili sendis lin kiel sian korespondanton al Argentino, por raportoj pri jugoslavaj elmigrintoj, kaj li tiel iĝis vojaĝanto en 1939. Post du jaroj li sufiĉe regis la hispanan por povi kunlabori en revuoj, kaj mem eldoni en Bonaero, en hispana lingvo, monatan revuon « *Rutas* » (Vojoj) dediĉitan al vojaĝoj, geografio, turismo, esploradoj, ktp. Laborante kiel ĵurnalisto por iu argentina ĵurnalo kaj por verki apartan raportaĵon li decidis aliĝi al tiam planata ekspedicio al Akonkagvo, la plej alta Sudamerika monto (pli ol 7000 m laŭ tiutempaj taksoj). En la posta vivo li plejparte vivtenis sin per ĵurnalisma laboro kontribuante al multaj gazetoj ĉefe en Sudameriko kaj Jugoslavio. En Jugoslavio li kontribuis al multaj porinfanaj gazetoj, tiel ke nova generacio eksciis pri Esperanto per liaj artikoloj en infanaj gazetoj. En la 60-aj jaroj li iĝis ankaŭ televida ĵurnalisto kiu filmis serion da tv-filmraportaĵoj por la Beograda Televido pri la Karavano de Amikeco (vojaĝado tra Afriko) por la Zagreba Televido pri esplorado de nekonataj triboj en Aŭstralio kaj Nov-Gvineo kaj por la Novisada Televido pri Bolivio, Ekvadoro kaj Peruo. Ankaŭ en Esperanto li estis elstara ĵurnalisto. Krom kontribuo al multaj E-gazetoj kaj revuoj li ĉefredaktis dum 8 jaroj la Geografian Revuon, E-Gazeton (komence IOE-Gazeto) de 1966-1972 (monata revuo – entute aperis 65 numeroj) kaj Velo dum ses

jaroj (1983-1988 - vojvodinia E-gazeto).

« *Geografia Revuo* » aperis inter 1956 ĝis 1964, po unu kajero jare, krom en 1959-1960 nek en 1962. La titol-paĝoj de senescepte ĉiuj ses kajeroj estas de Sekelj, nur en n-ro 4 li lasis la lokon de la ĉefartikolo al Aafke Haverman (« *Aviadile tra Afriko* ») kaj metis sian « *Kun la Ajnoj de Hokajdo* » kajer-mezen. Rigardata kiel tuto, « *Geografia Revuo* » estas kvazaŭ persona periodaĵo de Sekelj kun kelkaj aldonoj de amikoj.

Li vivtenis sin ĉefe de ĵurnalisma laboro (verkado de artikoloj kaj raportaĵoj por multaj diversaj gazetoj kaj revuoj) kaj per filmproduktado. Aperis 740 tradukoj de liaj artikoloj en gazetoj kaj revuoj. Eblas supozi ke li kunlaboris kun plurdeko da gazetoj kaj revuoj ĉefe en Jugoslavio, Hungario kaj sudamerikaj landoj. Kompreneble ankaŭ kun la E-gazetaro. Li realigis 7500 prelegojn pri siaj vojaĝoj kaj diversaj aliaj temoj.

Li travojaĝis 90 landojn de la mondo kaj dudeko da liaj libroj aperis 90-foje en diversaj lingvoj kaj eldonoj.

### **Filmisto**

Unua laborloko de Sekelj post lia diplomiĝo en Zagrebo estis en filmentrepreno Merkurfilm, kiu sendis lin lerni pri reĝisorado al Prago. Li lernis ĉe fama ĉeĥa reĝisoro Otokar Vavra dum 6 monatoj pri reĝisorado.

Post la reveno al Jugoslavio en sesdekaj jaroj gravan rolon en

informado ekhavis televido. Pro tio esploroj de nekonataj regionoj postulis ne nur bildan sed ankaŭ filman materialon. Tibor akceptis la defion kaj nun li ekuzis siajn sciojn kiel filmisto kiu mem reĝisoris, sed ankaŭ zorgis pri sono kaj lumo, zorgis pri laboro de kameraisto ktp en vojaĝoj en Novgineo kaj Aŭstralio. Li filmis por Zagreba televido serion da filmoj pri tiuj regionoj kaj tieaj indiĝenoj kiun la Zagreba televido prezentis en tutjugoslavia televida reto kiel serion de dek filmoj tuthoraj. Tiujn filmojn li faris sola. En dua duono de sepdekaj jaroj li faris filmojn pri Kolombio kaj Ekvadoro en kiuj li estis kun teamo de filmistoj de Televido Novi Sad, kiu elsendis tiujn vojaĝpriskribajn filmojn.

Li mem estis objekto de multaj televidaj elsendoj kaj intervjuoj ĉefe ĉe tiamaj jugoslavaj televido kaj granda plimulto de tiuj materialoj estas konservita en la koncernaj televido, ekzemple granda duhora intervjuo kun televida raportisto Hetrich.

### **Alpinisto**

En Argentino li lernis pri alpinismo preparante sin kaj partopreninte en la ekspedicio al Akonkagvo kaj li iris ankoraŭ unu fojon sur tiun danĝeran monton. Poste li grimpis sur multajn altegajn montegojn sur ĉiuj kontinentoj inter kiuj elstaras montoj en Nepalo, Meksikio kaj Kilimanĝaro en Afriko, Monto Kosciuszko en Aŭstralio. Lia detala priskribo de la ekspedicio al

Akonkagvo en hispanlingva libro iĝis lernolibro pri alpinismo en Meksikio kaj oni tiusence uzas ĝin ankaŭ en kelkaj aliaj sudamerikaj landoj.

### **Etnologo**

Dum siaj vojaĝoj li specialiĝis pri kolektado de indiĝenaj maskoj, ĉapoj kaj instrumentoj kaj la neskribita indiĝena poezio. Pri la ĉi-lasta li aperigis la libron « Elpafu la sagon », kiu aperis en la serbokroata kaj Esperanto. La materiajn kolektaĵojn de maskoj, instrumentoj kaj ĉapoj li donacis al Etnografia muzeo en Zagrebo kaj al Urba muzeo de Subotica el kiu plejparto poste estis transdonita al la muzeo de Senta (Serbio).

### **Aventuristo**

Kvankam tio neniam estis lia celo, la plej alloga aspekto de lia vivo por la publiko, aparte la neesperantista, estas aventureca karaktero. Serĉante la esencon de la homa animo li devis renkontiĝi kun ĉiuspecaj homoj en la plej malfacile atingeblaj mondopartoj. Li renkontis kaj studis aron da triboj en praarbaroj de Brazilo kaj Nov-Gvineo, kutimojn kaj vivmanierojn kaj filozofiojn de tiam nekonataj popoloj kaj popolgrupoj en Azio kaj Afriko kaj en multaj okazoj klopodante proksimiĝi al homoj nefidantaj blankulojn li troviĝis en vivdanĝero. En Esperanto pri tio rakontas ĉefe la libro « *La mondo de travivaĵoj* », 1981.

### **Politika aktivulo**

Inter aliaj talentoj Sekelj posedis kapablon rapide amikiĝi kaj povi

konvinke rilati kun politikistoj. Dum siaj vojaĝoj li estis akceptita de dudeko da ŝtatestroj kaj ofte li donis utilajn sugestojn al ili, studinte kaj vidinte detalojn de iliaj landoj. Li dum la vivo renkontiĝis kun pluraj ŝtatestroj kaj regnestroj: De Peron (argentina prezidanto) li ricevis distingon Ora Kondoro en 1946 kaj proponon akcepti argentinan ŝtatancon pro siaj meritoj rilate Akonkagvon. Li renkontiĝis kun Nehru (barata prezidanto) kaj Indira Gandhi (posta barata prezidantino), kaj kun Radhakrishnan li amikiĝis. Bolivia prezidanto Hertzog sendis lin esplori nekonatajn regionojn de Bolivio en 1948 kaj en 1949 proponis al li fondi sur bolivia teritorio gubernion por eŭropaj rifuĝintoj post la dua mondmilito kaj disponigis al li 100.000 hektarojn por tio. Tibor petis 4 milionojn, por kio estis necese atendi plian duonjaron ĝis la bolivia parlamento decidis pri tio, sed li ne emis atendi kaj malakceptis. Li renkontiĝis kun la reĝo Mahendra de Nepalo kiu dankis lin pro tio ke Tibor fondis unuan popoluniversitaton en tiu lando, kie li instruis Esperanton.

La pinto de lia politika aktivado estis en 1985 kiam li transprenis nome de UEA prepari duan rezolucion de UNESKO pri Esperanto. Li renkontiĝis kaj diskutis kun plurdeko da ŝtatprezidantoj, ministroj kaj diversnivelaj diplomatoj dum siaj 4 partoprenoj en UNESKO-konferencoj kaj plej multe en 1984 kaj 1985. Li unue sukcesis persvadi

la jugoslavian registaron proponi tiun rezolucion al la Asembleo de UNESKO en Sofio, kaj kunlabori kun aliaj Esperantistoj por persvadi registarojn de Ĉinio, Bulgario, Hungario, Pollando, San Marino kaj Kostariko subteni la rezolucion, vizitante dum kelkaj monatoj ambasadojn de tiuj 7 aliaj landoj, li sukcesis konvinki ilin ke ili proponu al siaj registaroj kaj ke tiuj akceptu subteni la rezolucion kaj fine en Sofio mem li varbis inter delegacioj de plurdek landoj por voĉdoni pri la rezolucio kiu efektive estis akceptita. Al tiuspeca lia agado ni povas aldoni ankaŭ lian kelkmonatan kunvivon kun hinda filozofo kaj politika aganto Vinoba Bhave kaj multajn rilatojn kun tribestroj kaj estroj en urboj kaj regionoj.



Verkistoj en Antverpeno dum UK:  
Georges Lagrange, Tibor Sekelj,  
Aldo de' Giorgi, William Auld kaj  
eldonisto Bruĉjo Casini

Sekvota...

**La liseuse**

Peut-être que vous possédez déjà une liseuse, ce petit appareil électronique qui rentre dans la poche du pardessus ou dans le sac à main et qui permet de stocker plusieurs centaines de livres électroniques et bien sûr de les lire, et cela sans trop de fatigue. Leur technologie utilise du papier électronique, qui cherche à imiter l'apparence d'une feuille imprimée et qui, comme le papier, ne nécessite pas d'énergie pour laisser un texte ou une image affichés. Contrairement aux techniques d'affichage classiques qui nécessitent un rétro-éclairage ou l'émission de photons ce qui est source de fatigue, le papier électronique est purement réfléchissant et utilise la lumière ambiante de la même manière que le papier classique. Il existe des « e-libroj », livres électroniques en espéranto : certains en téléchargement gratuits, d'autres payants. Indiquez nous votre expérience (adresse de site, livres téléchargeables, etc.) afin d'en faire profiter tous les lecteurs de SFS.

**Legilo por elektronikaj libroj**

Eble vi jam aĉetis legilon por legi elektronikajn librojn. Tiu eta elektronika aparato, kiun oni povas enpoŝigi en surtuton aŭ mansakon, ebligas stoki plurajn centojn da elektronikaj libroj, kiujn kompreneble oni povas legi sen tro da laciĝo.

Ĝia teknologio uzas elektronikan paperon, kiu postulas imiti presadon, kaj kiu, tiel papero, ne bezonas energion por afiŝitaj teksto aŭ bildo. Male al la kutimaj teknikoj de vidigo, kiu bezonas retro-lumigadon aŭ fotonradiadon, kaj tio estas fonto de laciĝo, elektronika papero estas nur reflektanta kaj uzas ĉirkaŭan lumon same kiel kutima papero.

Estas e-libroj, kiujn oni povas senpage elŝuti, aliaj page.

Bonvolu indiki al SFS vian sperton (TTT-ejon, titolojn de e-libroj elŝuteblaj page aŭ senpage ktp.), Tio profitos al ĉiuj.

Dankon al vi. C.M.

**Rondo Familia** : Post eksperimenta periodo oni konkludis ke la elŝutado de Familia Esperanto - la bulteno de Rondo Familia – denove estu senpaga kaj la kontribuo (al UEA-konto idoj-p) estu libervola kiel ĝi estis antaŭe.

La jubilea n-ro (50) de FE redaktita de Johan Derks estas escepte interesa kaj enhavriĉa, mi rekomendas ĝin trafoliumi kaj informi pri ĝi en viaj landaj kaj lokaj E-instancoj, aparte al E-familioj kaj gejunuloj.

Ĝi estas nun libere elŝutebla en la retejo de Rondo Familia,

[http://uea.org/rondo\\_familia/index.html](http://uea.org/rondo_familia/index.html)

Ĉiam pli da homoj havas kaj uzas inteligentajn telefonojn kaj tabul-komputilojn, funkciajn per la operacia sistemo androjdo. Kiel jula donaco por la Esperanto-movado ĵus aperis senpaga aplikaĵo "Esperanto-radio Muzaiko" por androjdaĵaj aparatoj, kiu ebligas aŭskultadon de 12 Esperantaj radio-kanaloj! La aplikaĵo estas senpage elŝutebla el la retbutiko de "android.com», por trovi ĝin faru serĉadon je la vorto: "Muzaiko" (alia metodo estas: <https://market.android.com/details?id=dk.nordfalk.esperanto.radio>)

Pola Retradio, Kaliningrada E-radio, 3ZZZ en Esperanto, Krokoloko, Muzaiko, Parolu Mondo, Peranto, Pola Retradio, Varsovia Vento, Verda Stacio, Voĉoj el Japanio. Per la aplikaĵo oni povas ne nur elekti inter la divers-dataj podkastoĵoj de tiuj 12 radio-kanaloj, sed ĝi aperigas ankaŭ la hejmpaĝojn de ili, kaj donas eblon por tuja kontaktado de redakcioj. La aplikaĵon projektis Jacob Nordfalk, profesia programisto, esperantisto. Ĉu vi volas uzi Esperanton kun via telefono? - Resumo kaj detaloj ĉe: <http://code.google.com/p/esperanto-telefono/> fonto:Ret-Info <http://www.eventoj.hu> Szilvási László

## MESAĜOĴ DE PROBAL DASGUPTA

### JE LA ZAMENHOF-TAGO

**Saluton, kunfestantoj de la Zamenhof-tago 2011,**

En julio 2012 festos sian centdudekkvinjaran datrevenon la internacia lingvo Esperanto. Tiu jubilea jaro komenciĝas nun. Diverse oni direktos siajn energiojn ĉi-jare. Vi jam aŭdis, aŭ baldaŭ aŭdos, pri diversaj instituciaj iniciatoj. Mi ĉi tie lanĉas iniciaton tute personan. Por povi ĝin facile identigi, mi nomas mian iniciaton "dekernisma"; ĝi baziĝas sur "kernisma" prezento de la interna ideo de nia lingvo. Laŭ mi la baza klopodo de la esperantista kolektivo -- atingi ion en la internaciaj forumoj bazitan sur nia Uneska atingo de 1954 kaj motivitan per nia starpunkto rilate la lingvan justecon kaj la homajn rajtojn -- tro ofte reliefigas kolizieron kontraŭ difinitaj

maljustaj aranĝoj kaj strukturoj. Por unuopa esperantisto, ne plu estas klare, kiamaniere ni povas persone esperantisti en nia vivado. Kompreneble nia partopreno en la kampanjoj kaj nia deflanka vivado al la atletoj, kiuj niavice kuras sur la internaciaj kurejoj, povas doni iom da senco al nia vivo. Sed la interna ideo de Esperanto bezonas ion pli. Por ke la esperantistoj restu fundamente ŝatantoj de la amikeco kaj de la pontofara entrepreno, ni devas povi bonvenigi kaj iniciati pontofaradon ankaŭ en la interpersona ekzisto. Ni estu rezolute kaj ĝisoste movado de memkonsciaj gastoj de la tero, kiuj lernas gastigi unu la alian. Tio ne nepre signifas, ke ni ĉiuj devas tujtuje fariĝi mediismo-kleraj agitantoj (vidu en mia ĉi-tema bloga afiŝo la klarigojn pri "Modelo Sep" por tio, kion mi sugestas al la aktivaj

mediistoj inter ni), sed la esperantisteco ja havu por ĉiu el ni vivipovan personan sencon. Mi volas hodiaŭ proponi al vi realigeblan jubileo-jaran kampanjon, per kiu vi ĉiuj povos ekde 2012 teni pli alte la verdan standardon en viaj loĝlokoj kaj viaj landoj. En la barata saĝo oni diras, ke elefanto instruas al la eksteruloj per siaj dentegoj, sed al sia intima rondo per la buŝinternaj dentetoj. Utilas do dividi la predikon en dentegan parton aleksteran kaj dentetan parton por la samideanaro.

***La alekstera versio de la Zamenhof-taga ideo***

Ni ĉiuj ĝissate aŭdis pri malnova mezuro, la tiel-nomata I-Kvo, la inteligento-kvocianto. En la lastaj jardekoj ni foje aŭdas ankaŭ pri piednoto al la I-Kvo; ĝi sin nomas la E-Kvo, la emociinteligento-kvocianto. En lingvoj kun aparta kvo-tipa litero oni uzas la formojn IQ kaj EQ, kiujn ni evidente ne kapablas legi per niaj kompatindaj esperantistaj okuloj, do mi helpas min per la anstataŭaĵo "Kvo". Nun aŭskultu, mi petas.

Mi proponas, ke ni vendu al la publiko post I-Kvo kaj E-Kvo novan kvocionton, kiun ni nomu A-Kvo – la amikec-kvocianto. Atentu vian rajton paralele nomi ĝin afablec-kvocianto, agrablec-kvocianto, se tio helpas viajn tradukojn en la etnajn lingvojn. La oficiala nomo estu simple A-Kvo, kaj ni uzu la vorton "amikec-kvocianto" kiel la plej kutiman dismeton de la akronimo en nia lingvo. Al la ekstera mondo, ni maksimume simplu. La marko A-Kvo (aŭ AQ, en alfabetoj

uzantaj tiun literon) kaj iu laŭlingve elektita vorta dismeto de tiu akronimo klarigu sin mem. Anstataŭ verki komentariojn pri tiu marko, mi nun transiru de tiu ĉi ekzotera sektoro al la esotera laboro de la elefantobuŝaj dentetoj.

### ***La samideanara versio de la Zamenhof-taga ideo***

En niaj propraj medioj -- en la asocioj, regionaj societoj, lokaj kluboj, kongresoj, renkontiĝoj, festivaloj, verde parolantaj familioj, ĉie -- ni devas ekde nun, krom kultivi Esperanton mem kaj ĝiajn konatajn plukonstruaĵojn, vendi al nia verda publiko la markon Esperanto-pluso. Treege longe ni ofereme pioniris la altkvalitan internacian gastigadon. Ni bonvenigadis eksterlandajn gastojn sur la skalo de kolektivaj aranĝoj kaj en niaj hejmoj per aŭ malper Pasporta Servo. Kun ama zorgo kaj kun laŭregione diversgrada rigoro ni kunmetadis kongresojn, kunloĝadojn, restadojn plej diversajn. Ni maksimumigis la fizikan aŭ kulturan komforton de niaj gastoj. Tiu gastiga etiko fariĝis nedisigebla parto de la esperantisma kulturo. Ni ĉiuj scias tion. Ni konsideru tiun tagordon atingita. Nun temas pri Esperanto-pluso, kaj monda ekonomia krizo donas al ni tre taŭgan okazon por lanĉi ĝin, kvankam ni kompreneble diru ne tion, sed ke spronas nin la magia cifero 125. Denove, por ke plej simplu kaj disvastigeblu la ideo, mi proponas, ke la marko Esperanto-pluso estu sia propra komentario. Ĝi estu diverse interpretata de la diversaj uzantoj kaj

... vastigantoj. (Mi lasas kiel ekzercon por vi trovi, kiu kiam oftege uzadis la verbon vastigi. Solvohelpilo: memoru, en kies datreveno ni interparolas.) Tamen, ĉar iuj el vi ŝatas ekzemplojn, mi sendas la ekzemplo-legendajn interesitojn al mia bloga aŝiŝo, en kiu troviĝas pli plena konkretigo de la propono: krozu al [probaleo.blogspot.com](http://probaleo.blogspot.com).

**Ĝenerale dirite**, mi proponas, ke Esperanto-pluso temu pri la sondado de la kutime vualataj kaj embarasaj malagrablaj nuancoj, kiuj ĉirkaŭas la surpodiajn momentojn de legitima gloro en niaj kongresoj, niaj kunloĝadoj k.s. Ni bonvenigu ne nur la interesajn pladojn, sed la tuton de la sperto gastigi, inkluzive la sentojn de sendanka sinofero kaj aliajn klavojn, kiujn la esperantista sperto senintence premas, foje lacigante aŭ kuspante nin. Farante ĉion ĉi, ni transiros de la nuna ŝtupo de niaj laboroj al tiel nete alia ŝtupo, ke neniu plu kuraĝos demandi, ĉu ni ne estas feblaj kaj senefikaj eksrivaloj de la vastigantoj de la angla. Kaj ni komencos konstati, ke por konstrui la vojon al la paco, foje necesas ne paroli rekte pri la interlanda paco mem, kiu restas ĉies celo, sed unike labori por teksti la ŝtofon, el kiu la morgaŭaj tajloroj verkos novajn, nenaciajn standardojn. Mi proponas al vi metodon por pli verve sperti nian unikecon, ol ni foje sukcesas sperti en niaj ĝisnunaj – tute ne subtaksindaj kaj absolute nepre daŭrigendaj – metodoj esperantisti. Mi ja ne volas sugesti, ke mankus al ni individua ludemo kaj

humurkapablo. Mi volas emfazi, ke ni nesufiĉe ligas la libron *Humoroj* (de Auld, mi faras metaforan uzon de la titolo) al lia pli konata epopeo *La infana raso*, kiu estis dediĉita al la heroo de Montevideo kaj kiu plej evidente esprimis la sencon de la esperantismaj streboj. Niaj italoj foje faris el unu poemo en *Humoroj* kanton, el kies teksto ĉi tie citindas *per skarpo malpura kovras vintra pejzaĝo / sian vizaĝon, kaj kraĉas sur ĉies planojn*. Kraĉas ankaŭ sur la strategiajn planojn. Ni devas preteriri tiun vintran humoron, ĉi-vintre (pardonu mian senhontan uzon de nordhemisferaj agordoj, samideanoj sudaj, mi scias, kiom someras ĉe vi), per pluaj humoroj indaj al la plenrajtaj kaj tial esperantistaj anoj de tiu "infana raso", kiu sin nomas – la homaro. Amike **Probal Dasgupta**  
**Prezidanto de UEA**

Le conseil d'administration de la Fédération  
Languedoc-Roussillon d'Espéranto

*\*Elektitaj/élus la 18a de aprilo 2009 en Lézignan-Corbières (renovigo/renouvellement en 2012 à Nîmes)*

Bony Jeannine, Esclapez Laurence, Hénin Jean,  
Lagrange Arno (sekretario/secrétaire:

[arno.raymond.lagrange@gmail.com](mailto:arno.raymond.lagrange@gmail.com)),

Maurel Line, Taupiac Pierre

*\*Elektitaj/élus la 18a de aprilo 2010 en Vergèze (renovigo en 2013)*

Bichon Véronique, Carbonnel Colette,  
Mouré Christian « redaktoro/rédacteur » de SFS  
(15 rue du Verdier 34120 Tourbes  
[xianmoure@orange.fr](mailto:xianmoure@orange.fr))

Passarella J-François prezidanto : président  
(10 passage J. Ferry 34290 SERVIAN  
[jf.passarella@free.fr](mailto:jf.passarella@free.fr))

Perez y Sanz Maria kasistino/trésorière (13bis, rue  
Haute 30310 Vergèze [maria.perez@orange.fr](mailto:maria.perez@orange.fr))

*\*Elektitaj/élus la 21a de majo 2011 en Béziers (renovigo/renouvellement en 2014)* Bernard Francis,  
Bernard Monique, Boccadifuoco Josée, Bourquin  
Frédéric, Eysseric Serge, Mraihy Zohra